



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2002 numero 3-a: majo / septembro

*Nepre rezervu vian sabaton 15-an de junio por renkontiĝi  
kun Renato Corsetti, la prezidanto de UEA!*



Desegnis Istvan Morocz

# Rememorigilo

## SES informas

### Redakcio:

Claude GACOND, Poŝfako 5031,  
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: [claud.gacond@ne.ch](mailto:claud.gacond@ne.ch) &  
[gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55,  
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29;  
indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj:  
Nancy FONTANNAZ, Richard  
SCHNELLER.

## SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,  
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-  
poŝto: [bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch).

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto, PF 301,  
8034 Zürich. ☎: 01 251 50 25. Retpoŝto:  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch).

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des  
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.

Retpoŝto: [n.margot@bluewin.ch](mailto:n.margot@bluewin.ch)  
Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13,  
2300 La Chaux-de-Fonds. ☎: 032 914 39  
34.

Retpoŝto: [elilauper@bluewin.ch](mailto:elilauper@bluewin.ch)  
Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj junul-  
ara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto:  
[chiara-fp@bluewin.ch](mailto:chiara-fp@bluewin.ch).

## SES informas

### Redaktaj datlimoj

por la venontaj numeroj

2002-4: dua duono de septembro –  
oktobro: aŭguste 25.

2002-5: novembro-decembro: oktobre  
15.

2003-1: januaro-februaro: decembre 15.  
Antaŭdankon al la estroj de la lokaj kaj  
fakaj societoj pro la atenta konsidero,  
kiun ili alportos al la koncernaj datoj  
por la planado de sia aktiveco.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo

2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90



# Svisa kalendaro

## Maje

- 16: Luzern: LES-kunveno.  
17-20: Husum, Germana Esperanto-Kongreso.  
23: Basel: ESB-kunveno.  
18-20: Strasbourg: Franca Esperanto-Kongreso.  
25-26: La Chaux-de-Fonds: KCE: Literatura monatfino.

## Junie

- 01-07: Plovdiv, Bulgario: 54-a IFEF-Kongreso.  
04: Genève: kunveno de La Stelo.  
05: Wil: EKW-kunveno.  
07-09: Zürich: ESZ: Semajnfina seminario kun magiisto TRIKSINI.  
11: Zürich: ESZ-kunveno.  
14: La Chaux-de-Fonds: KCE: Aperitivo.  
15: La Chaux-de-Fonds: CDELI: Prelego de Renato CORSETTI.  
20: Luzern: LES-kunveno.  
23: Lausanne: LES-ekskurso al Château d'Oex.  
27: Basel: ESB-kunveno.  
29-30: Neuchâtel: KCE: Ekspo 2002.

## Julie

- 03: Wil: EKW-kunveno.  
09: Zürich: ESZ-kunveno.  
13: Genève: La Stelo: kunveno.  
20: Luzern: LES-ekskurso.  
20-26: Leuven (Belgio) Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK.  
23-28: La Chaux-de-Fonds: KCE: Islam.

## Aŭguste

- 03-10: Fortaleza, Brazilo: 87-a Universala Kongreso de Esperanto.  
03-18: La Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.  
11: Wil: EKW-ekskurso.  
13: Zürich: ESZ-kunveno.  
18: Basel: ESB-ekskurso al Seewen.

- 18: La Chaux-de-Fonds: KCE: Svisa Ekzameno.  
22: Luzern: LES-kunveno.  
23-28: Eŭropa Kongreso en Verona.

## Septembre

- 03: Genève: La Stelo: kunveno.  
04: Wil: EKW-kunveno.  
10: Zürich: ESZ-kunveno.  
19: Luzern: LES-kunveno.  
21: La Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
28-29: Bellinzona: KCE: Monatfino.

## Oktobre

- 01: Genève: La Stelo: kunveno.  
01: Zürich: ESZ-informstando.  
02: Wil: EKW-kunveno.  
08: Zürich: ESZ-kunveno.  
12: Bern: SES: Kunveno aktivuloj.  
17: Luzern: LES-kunveno.

## Novembre

- 02-03: Rheineck: Kunveno Sunhejmo.  
05: Genève: La Stelo: kunveno.  
06: Wil: EKW-kunveno.  
16: La Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.  
21: Luzern: LES-kunveno.

## Decembre

- 03: Genève: La Stelo: kunveno.  
04: Luzern: LES-kunveno.  
04: Wil: EKW-kunveno.  
27 - Januare 03: Borken (DE) 19-a Internacia Festivalo.

## 2003-Januare

- 16: Luzern: LES-kunveno.

## Aŭgusto

- 12-19: La Chaux-de-Fonds: 76-a SAT-Kongreso.

# Tutsvisa kultura renkonto kun Renato Corsetti

prezidanto de UEA

Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds  
sabaton 15-an de junio

SES, CDELI kaj KCE, la organizantoj de la renkonto, esperas, ke esperantistoj el tuta Svislando profitos pri tiu unika rendezueblo kun Renato CORSETTI, grava personeco de la hodiaŭa esperanto-mondo.

Por minimuma kovro de la elspezoj estos petita partoprenkotizo de po F 20 por partoprenanto. Senpage por JES-anoj kaj por esperanto-komencantoj sekvantaj kurson.

Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenontoj bonvolu rete, telefone aŭ poŝtkarte anonci sian aliĝon al Claude GACOND.

Rete: [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

Poŝte: Claude Gacond, CP 5031,  
2305 La Chaux-de-Fonds 5.

Telefone: 032 926 52 32 (hejme  
vespere post la 20h00) aŭ 032 967  
68 55 (CDELI matene)

## Horaro de la renkonto

**9h00: Malfermo de la CDELI-salono:** eblo aĉeti brokantajn kaj novajn librojn. Enirejo tra la pordo nordorienta de la biblioteka domo, kie troviĝos bonvena afiŝo.

**10h00: Malfermo de la kunvena salono Charles Humbert.** Eniro tra la enirejo mem de la Biblioteko.

### 10h30: Oficiala malfermo:

Per retrobildoj la esperanto-lernantoj de la lernejo "*La Grande Ourse*" prezentas la prelegonton Renato CORSETTI kaj Hector HODLER la fondinton de UEA.

**11h00:** Aperitivo.

**11h30: Unua prelego de Renato CORSETTI:**

**Situacio de esperanto en la mondo.**

La preleganto larĝ-trajte prezentos la nunan situacion de la lingvo esperanto en la malsamaj mondopartoj. Apartan atenton li donos al la kontrastoj inter la

ecoj de la esperanto-movado en Eŭropo kaj en aliaj mondopartoj.

Li ne evitos respondi demandojn pri kiom da homoj parolas esperanton kaj kiom da homoj pagas sian kotizon. Krome li prezentos la problemojn de la esperanto-movado en la komenco de la tria jarmilo, en mondo dividita de ekonomia kurteno.

**12h30:** kuna iro al najbara italeca restoracio.

**12h45-14h00:** komuna tagmanĝo.

**14h15: Dua prelego de Renato CORSETTI:**

**Lingvaj homaj rajtoj.**

La ideoj de Zamenhof pri intergentaj rilatoj estas hodiaŭ same validaj kiel en la tempoj de Zamenhof mem. La homaro travivis grandegan teĥnikan revolucion dum la pasinta jarcento sed malgrandegan mensan evoluon, pro kio la malbonoj, je kiuj Zamenhof provis trovi rimedon per esperanto, estas ankoraŭ kun ni. La preleganto provos klarigi, kial oni nur bezonas rediri la pensojn de Zamenhof en pli moderna vesto, por ke homoj komprenu ilin. La kampanjo "*Lingvaj Homaj Rajtoj*" de UEA estas ĝuste tio.

15h00-15h15: paŭzo.

**15h15: Tria prelego de Renato CORSETTI:**

**La esperanto-movado en Eŭropo inter esperegoj kaj malesperegoj.**

La prelego provos montri la apartan situacion de la esperanto-movado en la landoj de Okcidenta kaj Orienta Eŭropo. La esperegoj rilatas al la

supozata efiko de raciaj argumentoj ĉe la politikistoj en Bruselo kaj al la eblecoj, kiujn ĝenerale la procedo de politika integriĝo en Eŭropo kuntrenas por esperanto.

La malesperegoj rilatas al la ĝenerala malatento de la publiko al nia temaro kaj al la supozata akcepto de solvoj je la problemo de lingvo internacia per nacia lingvo.

**16h00: Kunkludo de la renkonto en la CDELI-salono kun teumo, eblo aĉeti librojn kaj amika babilado.**

**17h00: Oficiala fermo de la renkonto.**

**Por atingi la bibliotekon**

**El la stacidomo:**

La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".

**Aŭtomobile:**

Aŭtomobilantoj ne parku sian veturilon en la biblioteka korto, sed en la najbaraj stratoj. Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

-oOo-

# Vivo de SES

## Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo

Hotelo Steghof, Luzern, sabate 6-an de aprilo, 14h00

21 personoj ĉeestas la kunvenon. Dietrich WEIDMANN, Sonja BRUN kaj Paul SCHERER mankas en la komenco pro radio-intervjuo.

### 1. Komunikoj de la prezidanto.

La prezidanto Bruno GRAF varmigas la etoson per amuza ludo sub la formo de testo pri la atenta legado de *SES informas*, fare de la ĉeestantoj. Laŭ la rezulto ŝajnas, ke multaj legas la bultenon de SES.

Senkulpiĝis Anita ALTHERR, Alain FAVRE, Chiara FABBRI, Claude GACOND, Angelo MELLINI, kaj François RANDIN. Claude GACOND, la redaktoro de *SES informas*, estas malhelpata pro sanaj problemoj, dum Chiara FABBRI, estraranino respondeca

de la itallingva regiono, baldaŭ naskos infanon.

**Forpasintaj membroj:** Per silenta momento ni honorigas 8 forpasintajn membrojn. Inter ili estas du meritplenaj honoraj membroj: Fritz LIECHTI kaj Werner LAEDERACH. La aliaj estas Danièle BEGUIN, Jean-Paul HUMBERSET, Denise MATTHEY, Cosette SANDOZ-GIROUD, Willy VOIROL kaj Amalia VEITH.

### Kompletigo de la Tagordo:

5a: Elekto de nova kaskontrolanto.

5b: Agado 2003.

### 2. Elekto de la voĉnombranto.

Mireille GROSJEAN, unuanime elektita.

### **3. Protokolo de la lastjara Ĝenerala Kunveno.**

Unuanime akceptita.

### **4. Jarkalkulo kaj bilanco 2001 kun raporto de la kaskontrolantoj.**

Ni povas ĝojige konstati, ke tiun ĉi jaron la jarkalkulo ne finiĝis kun deficitio. Pluraj faktoj kontribuis al tio:

- aparta donacemo de la membroj.
- duona prezo por kolektiva abono al *Literatura Foiro*.
- pli altaj bankaj interezoj.
- senpaga honor-ofica redaktado de *SES informas* far Claude GACOND.

La membroj malaltiĝis al 150, sed kreskis la abonantoj al *SES informas*.

Post lego de la raporto de la kaskontrolantoj, Paul SCHERER kaj Dieter ROOKE, la jarkalkulo kaj la bilanco estas unuanime akceptitaj, kun dankoj al nia kasistino Elisabeth LAUPER.

### **5. Agado kaj buĝeto 2002.**

La Romanda Regiona Sabato de la 15-a de junio, organizita kun CDELI, estos aparte grava tiun ĉi jaron kaj tial ĝi povas esti konsiderata kiel tutsvisa. Efektive Renato CORSETTI, prezidanto de UEA, vizitos CDELI-n en La Chaux-de-Fonds. Li renkontos la lernantojn de *La Grande Ourse (SESi 2002-2)* kaj parolos interalie pri la nova laborplano de UEA kaj la kontribuo de la landaj asocioj (vidu programon).

Aŭtune la prezidanto de SES intencas inviti la respondeculojn de ĉiuj lokaj societoj al rendevuo kun Andreas EMMERICH, la prezidanto de GEA.

En decembro la Alemana Regiona Semajnfino okazos en Zuriko.

Dieter ROOKE proponis kreon de aktivula grupeto, kiu aktivus en diversaj regionoj de Svislando por disdoni informilojn surstrate. Tiuj grupetoj kreigu laŭ la lingvaj regionoj kaj agu ankaŭ en etaj urboj, kie ne estas esperanto-societoj. Ni serĉas volontulojn. Unua sperto estas jam planita por Bazelo. Tiuj grupoj ne forgesu averti la koncernatajn lokajn societojn.

Mireille GROSJEAN akceptis informi la romandan gazetaron. Ŝia unua dosiero foriros komence de majo por kongrui kun la inaŭguro de la Nacia Ekspozicio, *Expo 02*, al kiu esperantistoj ne povis partopreni, kvankam esperanto bonege enirus la temon de la ekspozicio: Utopio. Al gazetoj de kontraŭ-tutmondistoj (ATTAC) ŝi informos pri la partopreno de esperantistoj en la Dua Socia Forumo de Porto Alegre.

Benno FRAUCHIGER, prezidanto de JES, prezentas sian projekton starigi kontaktojn per esperanto inter junuloj kaj landlimaj regionoj. Tiu projekto naskiĝis inter esperantaj junuloj de la regiono de Bazelo kaj Baden-Württemberg. Ĝi povus esti tri-landa projekto. Unue stariĝos kurso de esperanto cele al postaj renkontiĝoj. Tio eĉ povus celi eksterlandanojn de la koncernataj regionoj, kiuj penas integriĝi kaŭze de lingvaj bariloj.

Bruno GRAF dankas pro la prezentita projekto, kiun SES akompanos. Sed ĝi bezonas esti maturigita kaj ĝi koncernas ankaŭ ILEI-n kaj la bazelan societon.

## 5a. Kaskontrolantoj.

Paul SCHERER demisias. Kiel anstataŭanto Christiane SIXTUS POT estas unuanime elektita.

## 5b. Agado 2003.

1. SAT-kongreso okazos en La Chaux-de-Fonds organizita de KCE.

2. SES festos sian cent-jariĝon en aŭtuno 2003. Ni festos la 100-jariĝon de la esperantiĝo de Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT kaj la 50-jariĝon de la esperantiĝo de Claude GACOND.

Por festi tiujn jubileojn Claude GACOND planas tutsemajnan vojaĝon al lokoj kulture signifaj por la svisa esperantismo.

Paralelaj projektoj estas:

Eldono de Svisa Enciklopedio pri Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando, kiun redaktas Andy Künzli.

Eldono de dosieroj por ĵurnalistoj.

Migranta ekspozicieto unue prezentita en La Chaux-de-Fonds.

Informoj pri tio aperos en *SES informas* dum la proksimaj monatoj.

3. Decembre en Ĝenevo ĉe UN okazos Tutmonda Konferenco pri Komunikado. Mireille GROSJEAN estas la ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN. Ŝi pritraktos tion kun laborgrupo.

Mireille GROSJEAN aldonas, ke la situacio estas favora. Multo moviĝas, ĉefe kreigaĵoj movadoj kontraŭ tutmondismo. Dietrich WEIDMANN emfazas la avantaĝojn partopreni en alies aranĝoj. SES povus registri ilin, ĉar tiuj kosmopolitemaj asocioj estas malfermitaj al esperanto.

## Buĝeto.

**Argus:** La estraro modifis sian decidon. Ĉar la servo ne indas, ni decidis rezigni pri ĝi ekde fine de aprilo. Tio signifas en la buĝeto elspezon por Argus reduktita al F 500.-, kiu obligas altiĝi la buĝetitan sumon por varbado al F 4 600. Sed la enspezo F 400.- buĝetita por la neabono de societoj al Argus falos. La buĝeto estas unuanime adoptita.

**Kredito de F 15 000 de SES favore al KCE:** Laŭ rezolucio, kiu plenumiĝis en 2001, tiu kredito estis donita sen-interenze dum 5 jaroj. Post diskuto ni decidis por subteno al KCE:

- pruntedoni plu la krediton ĝis nedifinita tempo.
- rezigni pri interezo de 3%, t. e. donaci F 450 jare.
- kaze de repostulo lasi al KCE tempolimon de 6 monatoj.

Tio estas akceptita de 19 ĉeestantoj, kun 2 sindetenoj.

## 6. Propono de la estraro.

La estraro proponas krei kategorion de patronoj, kiuj pagas duoblan jarkotizon. Listo de la patronoj aperos en nia bulteno. Necesas aldoni al la artikolo 8-a "kotizoj" de la statuto literon "ĉ": "patronoj pagas duoblan bazan jarkotizon".

Akceptita de 19 ĉeestantoj kun 2 sindetenoj.

## 7. Diversaĵoj.

Sonja BRUN volas demisii de sia posteno kiel ĉefdelegito de UEA. Ni serĉas anstataŭanton.



Nancy FONTANNAZ memorigas, ke la perkoresponda kurso por franclingvanoj funkcias.

Laŭ peto de Andy KÜNZLI, Dietrich WEIDMANN parolas pri la retpaĝo de SES.

Dietrich WEIDMANN memorigas, ke li metas ĉiujn interesatojn al esperanto sur liston. Tiuj interesatoj ricevas tempaltempe la bultenon *SES informas* kun propono aboni ĝin. Tiu konstanta sendo de materialo realigas aliĝojn.

Mireille GROSJEAN rememorigas pri Asocio de la Edukistoj pri Paco: [www.qsepaix.ch](http://www.qsepaix.ch).

Protokolis Nicole MARGOT  
14-an de aprilo 2002.

## Patronoj de SES

La jarkunveno en Luzern enkondukis novan kategorion de SES-membroj: la **patronoj**.

Laŭ PIV patronoj estas eminentaj personoj protektantaj institucion aŭ, kiel ni dirus, subtenantaj la asocion grandanime morale kaj finance. Niaj patronoj fortikigos la asocion SES kaj esperanton.

Patronoj pagas duoblan bazan jarkotizon, membroj **ĝis 29 jaroj 2 x F 20.- = F 40.-, ekde 30 jaroj 2 x F 35.- = F 70.-**

Se vi jam pagis la kotizon 2002, vi farigos patrono 2002 pagante ankoraŭ F 20.- respektive F 35.- al nia poŝtkonto 17-581908-4 Svisa Esperanto Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds. Indiku: **Patrono 2002**.

Kial ni kreis tiun kategorion? Unue la jarkotizoj malaltiĝis pro la rezigno pri la

kolektiva abono al la revuo *Literatura Foiro*. Due membroj, kiuj ne havas tempon aŭ emon labori por esperanto, preferas doni monon. Trie la societo bezonas monon por pli aktiva informado, ĉar esperanto ne estas sufiĉe konata publike.

Ni aperigos la nomojn de la patronoj en nia bulteno *SES informas*. Ĉu ni povos baldaŭ mencii vian nomon? SES dankas pro via bonvolemo.

La prezidanto Bruno GRAF.

## Kunveno de la aktivuloj

Mi interkonsentis intervjuon kun Andreas EMMERICH, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kiu okazos en Bern sabate 12-an de oktobro posttagmeze. Por tiu renkontiĝo mi atendas aktivulojn el la tuta lando.

Detalajn informojn ni aperigos en la venonta numero de *SES informas*.

Bruno GRAF, prezidanto de SES.

## Donacoj

### Donacoj en Frankoj al SES :

Anonime: 400; Françoise BADOUX, Lausanne: 20; Franz & Margrit BRÜGGER, Emmenbrücke: 45; David BUHLMANN, Prilly: 30; Tazio CARLEVARO, Bellinzona: 20; Richard & Lucia CASSANI, Onex: 20; Verena & Gabriel CHAVES-WALDER, Flawil: 50; Nancy FONTANNAZ, Pully: 20; Claude & Andrée GACOND, La Chaux-de-Fonds: 50; Mireille GROSJEAN, Les Brenets: 70; John HASLER, Ostermündingen: 15; Nicole MARGOT, Lausanne: 35; Piroska MOROCZ,

Zürich: 25; PARZIVAL, Biel: 5; Paul SCHERER, Emmenbrücke: 40; Paul SCHULTHESS, Spreitenbach: 35; Tarzicia VISY, Zürich: 20; Lisette TESTAZ., Ollon: 25; Annemarie WAGNIERE, Lausanne: 15; **Sume: 940.**

**Donacoj en Frankoj por la Agado 2003:** . Nancy FONTANNAZ, Pully: 30; Miserez ROLAND, Grand-Lancy: 10; Richard SCHNELLER, Kronbühl: 20;

Ruth & Bert-Joris VAN PUIJENBROECK-WALDER, Winterthur: 30; **Sume: 90.**

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER kaj la redaktoro Claude GACOND dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco. Ili krome esperas, ke la pagilo akompananta la nunan bultenon revokos la malavarecon de la legantoj de "*SES informas*".

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centro de Dokumentado kaj  
Esploro pri la Lingvo Internacia  
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds  
☎ 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.

Retadreso: [CDELI.VCH@ne.ch](mailto:CDELI.VCH@ne.ch)

[martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch)

[claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)

[nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

### Venontaj studsabatoj

La kultura sabato de la **15-a de junio** kun Renato CORSETTI, la prezidanto de UEA, pro sia eksterordinara graveco, fariĝis tutsvisa kultura renkonto.

En la aŭtuno ni antaŭvidas la sekvajn aranĝojn, al kiuj estos invitataj ne nur esperanto-instruantoj, sed ankaŭ la lernantoj de la perkoresponda kurso kaj de aliaj kursoj. Formiĝos du studrondoj por komencantoj kaj por progresintoj. Tio inaŭguriĝos en la kunveno de la **21-a de septembro**.

La kunvenon de la **16-a de novembro** krome karakterizos la partopreno de "*Association suisse des éducateurs à la paix = ASEPAIX*", kiu kun Mireille GROSJEAN organizos unue sian **Ĝeneralan Asembleon** kaj poste ĉeestos franclingvan paroladon de Claude GACOND, kiu estos ankaŭ proponata al ĉiuj esperantostudentoj en Romandio. Detalaj informoj aperos en la venonta numero de *SES informas*.

# Novajoj de CDELI

Ni lasttempe danke ricevis kaj katalogis la jenajn verkojn :

Aŭtoro(j)	Titolo	Donaco de	Nombro
Cool, Gerard	La misio de SAVA	la aŭtoro	1 ekz.
Esperanto-Gruppe Nürnberg	Rückblick, reĝardo	Radio Italie Internat.	1 ekz.
Tubota, Kôki	[Folioj ĉiuj estas verdaj...]	Morita (S-ro)	1 ekz.
Gudskov, Nikolao	Malneŭtrale pri la neŭtrala	Richard Schneller	3 ekz.
Kapuściński, Ryszard	Ebono : raportoj el Afriko	Tomasz Chmielik	1 ekz.
(Diversaj)	Mondoj : 34 esperantaj rakontoj	Tomasz Chmielik	1 ekz.
Nadainada kaj Kobayashi	[Kio estis la 20a jarcento ?]	Morita (S-ro)	1 ekz.
Ferrière, Adolphe	L'autonomie des écoliers	Andrée Gacond	1 ekz.
Naville, Ernest	Le devoir	Andrée Gacond	1 ekz.
Descoedres, Alice	Le développement de l'enfant...	Andrée Gacond	1 ekz.
Ferrière, Adolphe	L'école active	Andrée Gacond	1 ekz.
Audemars et Lafendel	La maison des petits	Andrée Gacond	1 ekz.
Université IULM (Milano)	Catalogo di esperanto	tra T. Chmielik	1 ekz.
Umeda, Yoshimi	Manlibro por praktika komunikado	Morita (S-ro)	1 ekz.
Dobrzyński, Roman	Kantu kune	Cosette Sandoz	2 ekz.
(Diversaj)	Kantante antaŭen, 3a eld.	Cosette Sandoz	1 ekz.
(Diversaj)	Varsovio	Cosette Sandoz	1 ekz.
(Diversaj)	Senmatrikulaj artilerianoj	Cosette Sandoz	1 ekz.

Ni memorigas, ke :

1. unua ekzemplero ne povas eliri el la biblioteko
2. dua ekzemplero povas eliri en kelkaj kazoj
3. tria ekzemplero povas eliri laŭ la kutimaj prunteblecoj

Dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacantoj ! (pliaj titoloj aperos venontan fojon)

Martine SCHNELLER

## La kroniko de Martine SCHNELLER kiu respondas al demandoj

**En SES Informas vi aludis pri  
P.G. WODEHOUSE. Ĉu eblus scii  
iom pli ? (S-ino A. M.)**

Se, kiel iu foje diris al mi, humoristoĝ estas la bonfarantoj de la homaro, P. G. WODEHOUSE (1881-1975) certe estas reĝo inter tiuj bonfarantoj. Reĝo ne nur rilate la kvanton (ĉirkaŭ cent

libroj, muzikaj komedietoj, sennombraj artikoloj kaj radio-elsendoj<sup>1)</sup> sed reĝo ankaŭ rilate la inspiron, la original-econ, la stilon kaj tiun apartan vivo-filozofion, kiu subtenas la tuton.

Liaj verkoj transportas nin en apartan mondon, kiu ŝajne ie ekzistas en la angla kamparo – kaj en la belaj londonaj kvartaloj, kiuj verŝajne ankaŭ ekzistas ie ! Liaj personoj troviĝas en

<sup>1</sup> Tio donas al mi la ideon, ke mi parkerigos eble nur la duonon de lia verkaro !

plej diverse komplikaj situacioj, el kiuj necesas eliri... Sed ne timu : je la fino, kelkfoje je la lasta linio, ili sukcesos – precipe se Jeeves helpas ilin.

De la komenco ĝis la fino, ni ridetas, ni ridas aŭ ni ridegas. Dependas de la momentoj, de la miskomprenoj, de la situacioj, kiuj ekstravagance renversigas... de la floroj, de la porkoj, de la lumo kaj de la luno – kaj de ĉio, kio povas kontribui al tiu neimitebla wodehousa etoso.

Kelkfoje ni nur legas. Pro plezuro. Vere bone, Jeeves, kaj dankon !

(En *CDELI*, nur "*La princo kaj Betty*", 3 ekzempleroj)

### Kiu estas Napoléon BONAPARTE ?

(S-ro H. D.)

Napoléon BONAPARTE estas tre konata kaj simpatia detektivo de la aŭstralia literaturo. Laŭ mia scio ne esperantisto, kvankam "el du kulturoj". Lia kreinto estas Arthur UPFIELD. Mi bedaŭrinde ne scias, ĉu io el tiu aŭtoro estas tradukita al esperanto, sed mi metas la demandon al la legantaro.

Martine SCHNELLER

# ILEI

## Svisa Sekcio

Mireille GROSJEAN  
CP, 2416 Les Brenets.

[mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

### Prigazetara informado

En kunlaboro kun SES sub la titolo "*L'espéranto vit*" Mireille GROSJEAN

dissendis al la romanda gazetaro unuan dokumentaron "*Informations sur l'espéranto*" en ligo kun la malfermo de *Expo 02*.

## Ĝenerala Asembleo

Lucerno, 6an de aprilo 2002-04-06

Por esti laŭleĝa Ĝenerala Asembleo devas esti kunvokita 2 monatojn antaŭe. Ĉar tio ne okazis por nia asembleo de 2002 ni povis preni neniun decidon. Tamen estis mallonga dumkafumada kunsido tre agrabla, kiun partoprenis Nancy FONTANNAZ, Christiane SIXTUS POT (nova membro), Nicole BEROUD-FOCKE, Nicole MARGOT kaj la prezidantino Mireille GROSJEAN. Je la sama momento alia membro Didi WEIDMANN partoprenis radioelsendon en alia loko en Lucerno, do li ne povis ĉeesti. Alain FAVRE kaj Claude GACOND estis senkulpigataj.

Mireille GROSJEAN informis pri konkurso organizata de "*Fédération suisse pour l'Education des Adultes FSEA / Schweizerische Vereinigung für Erwachsenenbildung SVEB*". Povas eniri la konkurson plilertigaj kursoj por plenkreskuloj. Ŝi anoncis la studsabatojn en La Chaux-de-Fonds, valoraj renkontiĝoj organizataj de Claude GACOND sub la aŭspicio de Svisa ILEI-Sekcio. La celo ne estas gajni la konkurson, ĝi estas konigi niajn ekziston kaj agadojn. Ni vidos!

## Propono por 2003

Mireille GROSJEAN proponas al la ILEI-sekcion ĝeneralan Asembleon

de Svisa ILEI-Sekcio en marto 2003 en La Chaux-de-Fonds, kun vizito de la lernejo *La Grande Ourse* sub la gvidado de ĝia direktorino Vera ZASLAWSKI.

# JES

Junularo Esperantista Svislanda  
Jeunesse Espérantiste Suisse  
Junge Esperantisten der Schweiz  
Gioventù Esperantista Svizzera  
Giuventetga Esperantista Svizzer  
c/o Vera POCHANKE  
Zurlindenstrasse 110, 8003 Zürich  
Telefon-numeroj:  
hejma: +41.(0)1.451.16.51  
oficeja: +41.(0)1.255.25.37  
[veronika\\_p@hotmail.com](mailto:veronika_p@hotmail.com)

Kara SES-ano,

Aldonita al tiu eldono de *SES informas* vi ricevas nian novan bultenon « *jes! kompreneble...* ». Legu ĝin, ĝuu ĝin kaj transdonu ĝin al viaj junuloj. Ni celis krei bultenon ne nur por la junularo esperanta svislanda, sed ankaŭ por informi la gejunulojn ne-esperantlingvajn pri nia lingvo. Kompreneble, tio estas malfacila afero en lando, kie oni parolas multajn lingvojn, ĉar ne eblas nur uzi unu lingvon. Tamen, ĉu ne ĝuste tio montras plej efike, kial ni bezonas esperanton? Ne nur mondnivele aŭ eŭropanivele, sed eĉ svislandnivele? Trovante artikolojn en pluraj naciaj lingvoj kaj eble malbone komprenante alilingvajn artikolojn, la leganto ja komprenos, ke artikoloj en esperanto

malmodeste celas ne ĉefe unu regionon de Svislando, sed ĉiujn egale!

Kaj jes, kompreneble la eldono de bulteno belaspekta neniam estas senkosta. Do ni ĝojegus se, aliĝante kiel patrona membro aŭ donacante, vi helpos nin daŭrigi niajn klopodojn entuziasmigi la svisan junularon.

Kore salutas vin,  
Benno FRAUCHIGER,  
prezidanto de *jes!*

# KCE

Kultura Centro Esperantista  
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311  
2301 La Chaux-de-Fonds.  
Ø kaj fakso: (032) 926 74 07.  
[kce.esperanto@bluewin.ch](mailto:kce.esperanto@bluewin.ch)

## Raporto

### Maldekstro en esperantio

Sub la gvido de Kreŝimir BARKOVICH, ĝenerala sekretario de SAT, la 20-21-ajn de aprilo disvolviĝis seminario pri la temo *Kia rolo por la maldekstro en la nuna esperantio?*. Kontribuis Giorgio SILFER parole kaj Daniele VITALI, prezidanto de IKEL, skribe.

### SAT-Kongreso 2003

Okaze de la veno de Kreŝimir BARKOVICH decidiĝis, ke la 76-a SAT-Kongreso okazos en La Chaux-de-Fonds de la 12-a ĝis la 19-a de julio

2003. La organiza kongresa komitato pormomente konsistas el David BÜHLMANN, Francisko DEGOUL, Perla MARTINELLI, Dieter ROOKE kaj Giorgio SILFER.

## Renovigaj laboroj

Pro renovigaj laboroj en la domo Ernest NAVILLE la antaŭviditaj majaj aranĝoj ne okazos. KCE mem estos fermita al la vizitantoj de la 14-a de majo ĝis la 2-a de junio.

## Aperitivo

La vendredon 14-an de junio je la 18h00 KCE festos per publika aperitivo la domrenovigon kaj la trian datrevenon de la aĉeto de la domo NAVILLE.

## Kunvenoj

**Junie 29-30:** Esperanto-vizito en Ekspo 2002, Neuchâtel. La aliĝkotizo estos F 100.-

**Julie 23-28:** Islamo: kiel kompreni ĝin nuntempe? Prelegos Fabrizi PENNACCHIETTI, profesoro de la Universitato en Torino.

**Aŭguste 06-11 kaj 13-18:** plurnivela Internacia Kursaro.

**Aŭguste 18:** Somera sesio de la Svisa Esperanto-Ekzamenoj.

**Septembre 28-29:** En Tiĉino: Tagoj pri Edmond PRIVAT.

Laŭ informoj de Sonja BRUN kaj Heroldo komunikas.

# UEA

Universala Esperanto-Asocio

Svisa delegitino: Sonja BRUN

Waldeggstrasse 28, 6343 Rotkreuz.

☎ 041 790 46 40.

e-majlo: [smbrun@freesurf.ch](mailto:smbrun@freesurf.ch)

Karaj membroj,

UEA daŭre laboras por nia lingvo kaj klopodas informi vin pri tio per la gazeto *Esperanto*, kaj la novaj jarlibroj kaj gvidlibro estas en preparo. Sed nur tiuj, kiuj kotizis por 2002 daŭre ricevos tiujn informilojn. Se vi demandas vin, ĉu vi eble forgesis sendi la jarkotizon, ne timu, baldaŭ venos memorigilo!

Atentu ankaŭ pri la vizito de nia prezidanto Renato CORSETTI en junio, pri kio vi povas legi sur la paĝoj 4-5-aj. Venu multnombre kaj profitu de la ebleco konatiĝi kun la UEA-prezidanto. Mi antaŭĝojas renkonti multajn UEA-anojn je tiu evento.

Kun sinceraj salutoj,

Sonja BRUN

ĉefdelegito de UEA por Svislando



# Grupa vivo

## Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Salono

ĉe Haltingerstrasse 97

### Raporto

La 26-an de februaro ni renkontiĝis en gaja rondo por babili kaj gustumi rakledon. Post bonega senalkohola "Proseco" ni komencis la administrajn taskojn. Post la laboro komenciĝis rakledo. Sinjoro SENN en tute tradicia stilo havis duonan fromaĝradon, kiun li tenis en varmega hejtilo, tiel ke la fromaĝo ekfandiĝis. Ĝi bonege gustis kaj mi ne certas, ĉu mi iam ajn manĝis tiom bongustan rakledon. Deserte ni ankoraŭ gustumis bonegan glaciaĵon.

Nicole BEROUD

### Venontaj kunvenoj

**Maje 23** : Berthe SPALINGER invitas ĉe si al nudela salato kaj frukta desertaĵo je la 19h00. Aliĝo ĝis la 20-a de majo.

**Junie 27**: Minigolfo en la Grün 80 je la 19h00, renkontiĝo apud la restoracio. Post la ludo babilado sur la teraso de la restoracio.

**Julie**: Feriado.

**Aŭguste 18**: Ekskurso al Seewen. Por detaloj kontaktu s-ron H. P. SENN.

## Bern

### Esperanto-Grupo

Kunvenoj la unuan mardon de la monato  
Restoracio Möwenpick im Wächter  
Neuengasse 44

Post longa esploro ni fine trovis konvenan kunvenejon ĉe la restoracio "Möwenpick im Wächter" (angulo Neuengasse 44 /Genfergasse 4). Tie ni nun kunvenas ĉiam la unuan mardon de la monato ekde la 19h30, escepte kiam estas festotago. La samideanoj, kiuj volas scii, ĉu io okazos aŭ ne, simple povas voki min telefone: 031 381 56 74.

Margrit GULDIN.

# Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des Gares, Genève.

## Raporto

Laŭdojn oni esprimu al la redaktintoj de la marta numero de *Brasikfolio*, la ĉiam interesa informilo de "La Stelo". Tre konvena kaj bela aspekto. Enhavo ne nur interesa, sed ankaŭ inda je pli vasta diskonigo. Interalie la poemo, kiun Anita ALTHERR-MASE verkis en 1961 ĵus leginte la libron *La vivo de ZAMENHOF* de Edmond PRIVAT; la demando *Kiu verkis?* rilate al libroj kaj ties aŭtoroj, la citaĵoj *Anglais ou espéranto?* el la libro *Parlons Espéranto* de Jacques JOGUIN kaj el artikolo pri vojaĝo de *D-ro Zamenhof tra Svisujo* aperinta en *Svisa Espero* en 1905. Gratulon! Tiu informila numero atestas pri la kvalito de la laboro de la ĝenevaj esperantistoj.

Claude GACOND.

## Ĝenerala jarkunveno.

La ĝeneralan jarkunvenon partoprenis 17 membroj de La Stelo la 5-an de marto. Ili decidis statutmodifon por ebligi al la Estraro konsisti el nur 3 membroj anstataŭ 5, kaj tuj poste ili elektis novan komitaton, kies membroj estas Gilda PACE, Christiane SIXTUS kaj Eva VISCHER.

## Venontaj kunvenoj

**Junie 4:** Ludu lernante, lernu ludante! Ekde la 20h00 Andres kaj Camille Bickel proponos al vi variajn kaj diversnivelajn ludojn por uzi esperanton facile kaj agrable; speciale konvenas al komencantoj kaj personoj, kiuj timas erari. Ĉiu povos kunludi!

**Julie 13:** Sur la Insulo Rousseau je la 15h00. Kaze de pluvo renkontiĝo en la restoracio Le Lacustre.

**Aŭguste 17:** Sur la Insulo Rousseau je la 15h00. Kaze de pluvo renkontiĝo en la restoracio Le Lacustre.

Kaj por la sekvaj renkontoj en la restoracio Aux Cheminots rezervu la mardojn **septembro 3, oktobro 1, novembro 5, decembro 3.**

**2003 marto 4:** ĝenerala jarkunveno.

# Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

☎: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François RANDIN, en Chailly-Lausanne. Bonvolu telefone voki lin antaŭe 021 657 14 59.

## Raporto

La temo de la marta grupa kunveno estis prelego de Charlotte BLANC-MAILLARD pri pilgrimado al Santiago de Compostela. Fine de leginda dupaĝa artikolo aperinta en la maja laŭzana



*Informilo*, ŝi rakontas, ke je sepdeko da kilometroj de la urbo Burgos ekzistas svisa rifuĝejo de la "Amikoj de Sankta Jakobo" kaj lastjare ŝi deĵoris dum du semajnoj en ĝi. "Tiu aventuro, ŝi rakontas, *alportis al mi multajn kontentecojn. Mi admiras tiujn homojn, kiuj havas tiom multe da fido kaj kuraĝo por fari tiun pilgrimadon. Mi notis gravan punkton pri esperanto. Mi rimarkis, ke preskaŭ neniu aŭdis paroli pri la internacia lingvo. Sur tabulo mi bonvenigis niajn vizitantojn en la angla, franca, germana, itala, hispana kaj en esperanto. Mi parolis kun personoj el Rotterdam, kiuj loĝis je 100 metroj de Nieuwe Binnenweg kaj kiuj ne konis la vorton "esperanto". Imagu, ni havas ankoraŭ multon por fari, ŝi konkludas, aldonante Dank'al la Jarlibro mi donis esperanto-klubajn adresojn de multaj landoj. Mi esperas, ke mi alportis ŝtoneton por la konigo de nia lingvo".* Ĉijare Charlotte BLANC baldaŭ daŭrigos sian utilan por-esperantan informadon en tiu rifuĝejo.

Claude GACOND

## Venontaj kunvenoj

**Junie 23: Dimanĉa ekskurso-tago.** Ĉi-jare Marguerite JACCARD bonvolas gvidi la migremulojn tra sia bela regiono de Château d'Oex. En la programo: vizito de muzeo, marŝo (kunhavu bonajn ŝuojn) pli malpli longa laŭ la marŝ-ebloj de la partoprenantoj, vizito de artefarita fromaĝejo. Manĝo ĉe montara restoracio koston ekde po F 12.50 por telero.

Dum **julio kaj aŭgusto** partopreno al la feria pasporto.

# Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

☎ 041 280 26 42.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

## Raporto

La jubilea festo de la 6-a de aprilo certe digne markis la 75-an jaron de la fondo de Lucerna Esperanto-Societo kaj la baldaŭan centjaran jubileon eĉ de la ekzisto de poresperanta aktiveco en Lucerno. Bibliografie restos el tiu manifestacio du dokumentoj komplementaj, la artikolo mem de Andy KÜNZLI, kiun ni publikigas en tiu ĉi numero de *SES informas* kaj la plaĉa broŝuro eldonita de LES sub la titolo *Geesperantistoj en centra Svislando 1903-1919 kaj 1927-2002*.

Fine de sia laŭdacio pri la historio de esperanto en Lucerno Andy KÜNZLI anoncis, (ni citas lin) "*mi denove aliĝas kiel membro de Lucerna Esperanto-Societo, al kiu mi ŝuldas la komencan karieron kiel esperantisto, se oni volas tiel diri, kvazaŭ esprimo de simpatio al*

*tiu esperanto-klubo. Jubileoj havas ĉiam la avantaĝon, ke oni okupiĝas pri la historio – do bonvena momento ankaŭ por verki la kronikon de la lucerna esperanto-movado, kiu fariĝos integra parto de la planata Svisa Planlingva Enciklopedio."*

La artikolo, kiun ni publikigas ĉi-numere, estas enhance pli vasta ol lia lucerna prelego. En ĝi Andy Künzli ankaŭ mencias la aktivecon de aliplanlingvaj adeptoj kaj tiel reale ekanoncas la enciklopedian verkon, kiun li pretigas, sed kies eldona realiĝo certe dependos de la monrimedoj, kiujn la Agado 2003 ankoraŭ akiras dank'al la malavara donacemo de niaj legantoj. Ilin mi antaŭdankas pro la atento, kiun ili tiurilate donos al la pagilo, kiu akompanas nian bultenon. Ilia donacemo esprimu ilian deziron foje havi en la manoj libron, kiu iom objektive raportas pri la disvolviĝo de esperanto en nia svisa federacio plurlingva, kiu daŭre sopiras al malkovro de reale komuna helpplingvo.

Claude GACOND.

## PROGRAMO

**Maje 16:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 20h00: kun Anĝelo MELLINI: Poemoj kaj rakontoj.

**Junie 5:** Simplon 14h00-16h00.

**20:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono kaj 20h00: ludoj kaj enigmoj.

**Julie 3:** Simplon 14h00-16h00.

**20:** Ekskurso kun Margrit SCHERER: Ĝia programo koniĝos en junio.

**Aŭguste 22:** 19h30: rendevuo ĉe Wagenbach-fontano por promenado kun Paul SCHERER.

**Septembre 4:** Simplon 14h00-16h00.

**19:** 19h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 20h00: kun Louise BACHMANN: impresoj pri Skandinavio.

**Oktobre 17:** 14h30: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono. 14h30: kun Dieter ROOKE: 87-a Universala Kongreso en Fortalezo (Brazilo).

**Novembre 6:** Simplon 14h00-16h00.

**21:** 14h00: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono, 14h30: kun ĉiuj LES-anoj: kompilado de la programo 2003.

**Decembre 4:** Simplon 14h00-16h00.

**2003 Januare 8:** Simplon 14h00-16h00.

**16:** 14h00: kun Franz BRÜGGER: paroliga leciono kaj 14h30: intervjuo pri la kosmo.

## Kantono de Neuchâtel

### Studaj rondoj ĉe CDELI La Chaux-de-Fonds

La studrondoj kun Claude GACOND interrompiĝos ĝis la aŭtuno. Tiam ĉe CDELI help-laboros Monika MOLNAR el Hungario, lerta esperanto-instruistino. Kun ŝia helpo Claude GACOND esperas provi lanĉi kurson por komencantoj kaj plivigliĝi la studrondon por progresantoj. Pri ĉio tio ni raportos en la venonta bulteno.

Ni ankaŭ provos organizi esperanto-instruadon en Neuchâtel. Ĉu iu povus malkovri aŭ proponi agrablajn renkontiĝejon?

# Rheineck

## Sunhejmo

### Esperanto-programo

**Novembre 2-3:** Konferenceto por atelistoj. Organizanto: Dieter ROOKE, Äusserer Klus 14, 4702 Oensingen.

# Wil

### Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ☎ 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## Venontaj kunvenoj

**Junie 5:** Kun Vera POCHANKE: Hinda geedziĝfesto en Madras.

**Julie 3:** Kun Stanislaw POCHANKE: Minigolfludo (renkontiĝo ĉe la stacidomo Wil je la 19h00).

**Aŭguste 11:** Kun Verena CHAVES-WALDER: Tuttaga ekskurso al Bergli Fuchsacker (renkontiĝo ĉe la stacidomo Flawil je la 09h30). Informoj ĉe Verena.

**Septembre 4:** Kun Dieter ROOKE: 87-a UK en Fortalezo (Brazilo).

**Oktobre 2:** Kun Stanislaw POCHANKE: Ni legas esperantogazetojn.

**Novembre 6:** Temo elektota.

**Decembre 4:** Kun Barbara POCHANKE: Barbara-Tago kun fonduo.

# Zürich

### Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH

☎ 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an mardon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

## Venontaj kunvenoj

### Maje ĵaŭde 16:

18h15-20h00. Komenco de la esperanto-kurso por komencantoj k-2002-03 (regule dum 10 ĵaŭdvesperoj ĝis julio) / Beginn des Esperanto-Kurses für Anfänger (regelmässig 10 DonnerstagAbende bis Juli)

### Junie vendrede 7 ĝis dimanĉe 9:

Lerni sorĉi. Semajnfina seminario kun la magiisto TRIKSINI / Zeubern lernen. Wochenendseminar mit dem Magier TRIXINI. (Vidu la aldonitan flavan informilon.

### Junie marde 11:

19h30: Konversacia rondo por ekzerci la lingvon / Esperanto-Konversationsrunde zum Üben der Sprache.

20h00: Prelego pri la temo "Homaranismo la esperanto-humanismo de Zamenhof" / Vortrag zum Thema "Homaranismus, der Esperanto-Humanismus von Zamenhof."

**Julie marde 9:**

19h30: Konversacia rondo por ekzerci la lingvon / Esperanto-Konversationsrunde zum Üben der Sprache.

20h00: Prelego pri la temo "Historio de la esperanto-movado" / Vortrag zum Thema "Geschichte der Esperanto-Bewegung".

**Aŭguste marde 13:**

1930: Konvesacia rondo por ekzerci la lingvon / Esperanto-Konversationsrunde zum Üben der Sprache.

20h00: Prelego pri la temo "kongresaj impresoj" / Vortrag zum Thema "Kongress-Eindrücke".

**Aŭguste marde 30:**

20h15-22h00: Kurso de Kuba salso por komencantoj (vendredvespere ĝis la 4-a de oktobro) / Kurs kubanische Salsa für Anfänger (6 Freitagabende bis am 4. Oktober).

**Septembre marde 10:**

19h30: Konversacia rondo por ekzerci la lingvon / Esperanto-Konversationsrunde zum Üben der Sprache.

20h00: Prelego pri la temo "esperanto en perspektivo". / Vortrag zum Thema "Perspektiven des Esperanto".

**Oktobre marde 1:**

16h00-20h00: Informstando en Zuriko. Helpantoj kaj interesuloj bonvenaj / Informationsstand in Zürich. Helfer und Interessenten willkommen.

**Oktobre marde 8:**

19h30: Konversacia rondo por ekzerci la lingvon / Esperanto-Konversationsrunde zum Üben der Sprache.

20h00: Prelego en la germana lingvo: "Kial nun lerni esperanton?" (Venu kun viaj geamikoj) / Vortrag in der deutschen Sprache: "Warum jetzt Esperanto lernen? (Bringt Eure Freunde mit!).

**Oktobre jaŭde 24:**

18h15-20h00. Komenco de la esperanto-kurso por komencantoj k-2002-07 (regule dum 10 jaŭd-vesperoj ĝis januaro 2003) / Beginn des Esperanto-Kurses für Anfänger (regelmässig 10 DonnerstagAbende bis Januar 2003).

# Morto

Werner Laederach-Emmes

17.01.1912-01.03.2002

Werner LAEDERACH estis asekura matematikisto kaj diplomita asekuristo. De 1931 ĝis 1977 li laboris en la zurika asekurejo "Rentenanstalt".

Li eklernis esperanton en 1931 okaze de lingvo-kurso de Andreo CSEH kaj aliĝis al Zurika Esperanto-Societo en 1942. Ĝin li aktive servis unue kiel sekretario en 1947, poste kiel prezidanto en 1948, vicprezidanto ekde 1981 ĝis 1992 kaj honora membro ekde 1962.

Werner LAEDERACH prezidis SES-n de 1950 ĝis 1953 kaj duan fojon de 1966 ĝis 1971. Li ankaŭ agadis kiel ano de la Ekzamena Komitato de 1964 ĝis 1980 kaj kiel ĝia prezidanto en 1965-1966. Li estis honora membro de SES ekde 1974.

Dum la kvindekaj jaroj li aktivis kadre de la kunordigitaj esperanto-kursoj (KEK 1951-1961) kiel sekretario kaj esperanto-instruisto ĉe la Zurika Popola Altlernejo, kaj en 1987-88 li instruis esperanton en zurika vojaĝ-altlernejo.

Ekde 1957 ĝis 1980 li reprezentis SES-n kiel delegito en la Svisa Nacia Komitato de Unesko.

En 1967, kiel SES-prezidanto, li kunfondis CDELI-n en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds kaj en 1968 li troviĝis en Biel/Bienne inter la fondintoj de KCE, en kiu li poste kunlaboris plurajn jarojn kiel ano de la Komisiono Esperanto Lernejen.

Membro de UEA ekde 1943, Werner LAEDERACH fariĝis fak-delegito pri asekuro kaj 1956-78 vicdelegito por Zürich. En 1947 li aliĝis al Universala Ligo fondita de Edmond PRIVAT. Kaj en 1976-78 li prezidis la LKK-n de la 64-a Universala Kongreso okazinta en Luzern en 1978.

Ankaŭ lia edzino Martha LAEDERACH-EMMES kaj lia filino

Suzanne PLONNER-LAEDERACH partoprenis la esperanto-vivon.

Werner LAEDERACH emeritiĝis el siaj poresperantaj aktivecoj post la Universala Kongreso en Luzern kaj antaŭ kelkaj jaroj li donacis sian esperanto-bibliotekon al CDELI.

Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI.

## Libera tribuno

### Ni reagu kontraŭ minaco je lingva diverseco!

En 1961 aperis "*Anglo-American Conference Report 1961*" menciita en "*Linguistic Imperialism*" Oxford University Press, aĉetebla per [www.alapage.com](http://www.alapage.com), en kiu oni povas legi, ke Britio kaj Usono decidis propagi la anglan lingvon perforte, tio estas sen konsidero je naciemaj reagoj de la aliaj landoj. Ĵurnalisto parolas pri "kokakolokolonizado". Ni travivas ĝin de pluraj jaroj. Mi eksciis pri la alemana eldiro "swinglisch" = "swiss english". Mi jam konas delonge "le franglais", miksaĵo inter "le français" kaj "l'anglais".

Ĉe komercaj entreprenoj mi ofte skribas dirante: "*Ĉu vi estas finance subtenataj de Coca Cola? Ĉu niaj lingvoj ne estas sufiĉe riĉaj?*" Ĉiam la respondoj estas interesaj; foje iom aŭ tre stultaj... Mi ricevus tre bonan respondon de la semajna revuo "*L'Hebdo*"; la ĉefredaktorino Ariane

DAYER skribis, ke ŝi estontece atentos pri minimuma uzo de anglicismoj.

Nun la federacia ofico por publika sano lanĉis kampanjon "*feel your power!*" kaj la federacia buroo por egaleco inter virinoj kaj viroj lanĉis "*fairplay at home*". Tion mi ne akceptas; tion ni ne devas akcepti. La Konfederacio devas protekti la svisajn lingvojn kaj laŭ mi ne rajtas propagandi per la angla. Niaj reagoj

neniel devas mencii esperanton. Ni devas simple mencii nian emon je lingva diverseco kaj je kultura divers-eco. Tiel ni preparas la terenon por posta varbado por esperanto.

La adresoj de tiuj du instancoj estas simple: Ilia nomo + 3003 Bern Berne

Mireille GROSJEAN, Les Brenets

# Nia Historio

## LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO 1927 – 2002: 75-jara

**Andy KÜNZLI**

### Unua oficiala esperanto-grupo

La unua oficiala Esperanto-Grupo en Lucerno estis fondita la 6-an de aprilo 1927 – do antaŭ 75 jaroj.

Se oni esploras la historion de la svisa esperanto-movado ekde la komenco ĝis hodiaŭ surbaze de la periodaĵoj *Svisa Espero* kaj *Svisa Esperanto-Revuo*, oni frontas la raport-truon de la dudekaj jaroj, kiam *Svisa Espero* ne aperis. Fakte, ĝuste la dudekaj jaroj de la 20-a jarcento eniris la historion de la esperanto-movado kiel tre vigla kaj grava periodo, dank'al la kontribuo de la eble plej eminenta svisa samideano Edmond PRIVAT (1889-1962).

Bedaŭrinde en tiu epoko *Svisa Espero* ne aperis kaj la revuo *Esperanto* de UEA redaktata de PRIVAT ne registris ĉiujn klubajn eventojn de la mondo, tiel ke la scio pri la fondo de la unua Lucerna Esperanto-Grupo la 6-an de aprilo 1927 ne povis esti distrumpetita tra la esperanto-gazetaro.

La scion pri ĝia fondo ni do dankas sole al la modesta, manskribita protokolo de la kluba sekretario HUBER, elfosita de nia samideano Paul SCHERER, nuntempa prezidanto de Lucerna Esperanto-Societo.

### Unuaj lucernaj esperantistoj

Sed la lucernanoj estus tro modestaj kaj ne dirus la tutan veron, se ili asertus aŭ ŝajnis la impreson, ke ilia movado estas 75-jara.

La unua informo pri esperantistoj en Lucerno jam datas el la jaro 1903, nome el la dua numero de la "*Dua*

*nomaro de l' anoj de l' Svisa Esperanto Societo*", kiu estis eldonita en la revuo *Svisa Espero* en aprilo 1903, kaj kiu listigis la nomojn de **Paul PROBST** kaj **F. ACKERMANN**, kies adreso estis ĉe la fer-entrepreno **VON MOOS**.

Do, la venonta jaro 2003 donus la okazon festi la aperon de la unua lucerna esperantisto antaŭ cent jaroj.

Komence de 1905 **Eduard ZEDER** instruis esperanton al 13 personoj; samtempe realiĝis diversaj prelegoj, aperis gazet-artikoloj en la loka gazetaro kaj estiĝis la kerno de la unua Lucerna Esperanto-Grupo, dank'al la apogo de **J. ZIMMERMANN**, direktoro de la lucerna Pac-Muzeo.

En 1906 estis malfermita Esperanto-Oficejo ĉe iu libristo en Kappelgasse. La Esperanto Grupo kunvenis en la lernejo Săli – cetero en la loko de mia propra baza lernejo-tempo.

### **Pri la lingvo Volapük**

Nun ni malŝparu kelkajn vortojn pri la planlingva movado antaŭ la esperanta en Lucerno, nome pri la volapuka movado, kiu nepre ne devus esti forgesita en tiu kunteksto.

Kiel konate la lingvo Volapük disvastiĝis ekde 1879 elde la paroĥejo de la sudbadena vilaĝo Litzelstetten apud Konstanco fare de la katolika pastro Johann Martin SCHLEYER (1831-1912).

En Lucerno Volapük estis propagandita de Alexander RUEDIN (1840-1897)), neŭŝatel-devena lingvoinstruisto ĉe la kantona Reallernejo. Lin aktive helpis Ulrich GUTENSOHN, Wilhelm WETTSTEIN kaj Gustav BOSSARD.

La lucernaj volapukistoj renkontiĝadis en la fama hotelo "Adler". Dum 1888 Alexander RUEDIN kompilis la faldfolion *Uebersichtliches Tableau der Volapük-Litteratur* kaj Wettstein prizorgis angulon pri *Volapük* en la loka gazeto *Luzerner Tagblatt*.

Alia tre fervora volapukisto estis Wilhelm WICK, direktoro de la komerca kaj lingva instituto en Meggen apud Lucerno. Li enkondukis volapukon en la lernoplanon kiel instru-objekton kaj fondis societon.

Ni do konstatas, ke Lucerno havas antaŭ-esperantan planlingvan historion kaj ke tiel ĝi povas pretendi al firma planlingva tradicio.

### **Ĝenerala kunveno de SES**

En 1905 la tria Ĝenerala Kunveno de SES disvolviĝis en Lucerno kaj traktis interalie la inviton de la dua Universala Kongreso al Svislando. Unu jaron poste tiu dua Universala Kongreso fakte realiĝis en Ĝenevo.

### **Rezisto al Ido**

Tiutempe en Lucerno estis propagandate ankaŭ favore al la "Delegacio por la adopto de lingvo internacia", iniciatita en 1900 de Léopold LEAU kaj Louis COUTURAT, la francaj patroj de la lingvo Ido. La iom signifa lucerna Ido-movado, kun kiu simpatiis ne malmultaj katolikoj kaj maldekstruloj, funkcios poste ĉefe en la dudekaj jaroj.

Malgraŭ la konkurenco de la idistoj, kelkaj novuloj kiel **d-ro BUCHER-HELLER**, redaktoro de la loka gazeto „*Eidgenosse*“ kaj **J. FORSTER**, instruisto de la centra svisa trafiklernejo

rezistis al la *Ido*-krizo, preferante la vojono de ZAMENHOF.

Fine de 1908 J. FORSTER fariĝis kaskisto de la ĵus fondita Svisa Esperanto-Biblioteko kaj en 1909 gvidis la grupon de lucernaj esperantistoj, kies aliaj estraranoj nomiĝis M. TROXLER kaj A. BRÜTSCHLIN. La grupo kunvenadis en la lernejo Musegg kaj okupiĝis ĉefe pri tradukado de tekstoj kaj faris konversaciajn ekzercojn. Nova kurso kun 15 partoprenantoj povis esti gvidata de **d-ro Albert HEIM**, kaj ĉe la konata presejo C. J. BUCHER aperis ilustrita prospekta libreto en esperanto pri la Lucerna Glaĉera Ĝardeno (1909), en la traduko de la lucernaj esperantistoj.

### **Internacia Esperanto-Paradizo**

En novembro 1908 estis fondita alia Esperantista Grupo en Meggen apud Lucerno kun 12 membroj. En ĉi tiu bela loko ĉe la Kvarkantona Lago ekestis Internacia Esperanto-Paradizo kadre de la hotelo Gotlieben, kiel internacia ripozejo por esperantistoj. En 1912 la feriejo gastigis la eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon de SES, la distrikatan kunvenon de UEA kaj la ĵarkunvenon de Svisa Esperanta Kuracista Asocio. La solenaĵon ĉeestis ankaŭ Hector HODLER, kiu prelegis pri la historio de la tiam ankoraŭ juna esperanto-movado. La Esperanto-Paradizo en Meggen floradis ĝis 1914, kiam la unua mondmilito abrupte lamigis la poresperantan agadon.

### **Milit-konsekvencoj**

Laŭ la informoj, kiujn ni disponas, la unua mondmilito havis ĝenerale tre mal-

favorajn sekvojn por la movado. En Lucerno vivis kelkaj izolaj esperantistoj. Inter ili la grizon-devena instruisto **Stephan SIMEON** (1863-1942), kiu esperantiĝis en 1910. Li rilatis kun internigitaj eksterlandaj soldatoj. Kelkaj el ili sekvis esperanto-kurson, kaj la 23-an de marto 1917 ili povis akcepti en hotelo Beau-Rivage siajn premiojn, donacitajn de la ĝeneva Nova Ekzamena Komitato.

Malgraŭ tiuj agadoj, en la revuo *Svisa Espero*, la SES-sekretario Jules PERLET bedaŭras la malfortiĝon de la lucerna esperanto-movado, despli ĉar li vidis en Lucerno la gravan urbon por la fremdaj turistoj, kiujn necesus servi ankaŭ pere de esperanto.

La krizon de la internacia esperantomovado influis, krom la militaj eventoj, ankaŭ la morto de ZAMENHOF en 1917.

Por doni novan puŝon al la lucerna movado, Svisa Esperanto-Societo invitis en 1919 la Ĝeneralan Kunvenon al Lucerno ĉe hotelo Flora. La temo "propagando" estis traktita, sed ŝajne ĝi ne alportis fruktojn, ĉar dum la postaj jaroj la lucerna esperanto-movado malaperos, kune kun la adeptoj de la unua generacio, inter kiuj pluraj mortis.

### **Novaj aktivuloj**

Ĉi tiu morta epoko daŭris ĝis la jaro 1927, kiam nekonata propagandisto gvidis kurson, kiun sekvis kaj finis 7 personoj. Ĉi tiuj novaj esperantistoj kunvenis la 6-an de aprilo por fondi la Lucernan Esperanto-Grupon, kies 75-jaran jubileon ni do festas en 2002. La aktivuloj nomiĝis **Richard HUBER**, **HILFIKER**, **WALDIS**, **SCHNIEPER** kaj



**BÜHLMANN.** Pri ili ni – aŭ almenaŭ mi – bedaŭrinde ne posedas informojn.

Anstataŭ anonci la fondon de la nova Lucerna Esperanto-Grupo la ĉefa revuo *Esperanto* de UEA almenaŭ komunikis en junio 1927, ke esperantistoj vizitantaj Lucernon povas loĝi en hotelo Raben, ĉar ĝia estro, Claude WALDIS, paroletas esperanton. En 1928 la grupon prezidis dum kelkaj monatoj Anton EGGERMANN.

En 1929 en la Lucerna Esperanto-Grupo membris 17 personoj. La libro-vendisto **Josef HAAS** vendis esperanto-librojn kaj -gazetojn.

Dum la ekonomie krizaj tridekaj jaroj la Lucerna Grupo vegetas, ĝis kiam Eduard SPIELMANN, la direktoro de la Svisa Esperanto-Instituto en Berno, gvidas novan kurson en 1937.

Eduard SPIELMANN ne nur esence kontribuis al la renaskiĝo de la Lucerna Grupo, sed ankaŭ multe klopodis por la esperanto-movado en aliaj urboj kaj firme kunhelpis la okazigon de la 31-a Universala Kongreso en Berno en 1939.

Laŭ la sciigoj, kiujn ni disponas el *Svisa Espero*, la dua mondmilito ne tiom interrompis la movadon kiel faris tion la unua milito. Kun Richard HUBER la lucernaj esperantistoj pli malpli regule kunvenis en hotelo Raben.

### **Efika varbmetodo.**

En 1942 mortis la 79-jara klubano Stephan SIMEON, eksinstruisto en la urba lernejo, kiu esperantiĝis en 1910. Tamen en 1946 la septembra-oktobra numero de *Svisa Espero* komunikas, ke *"dank' al la viglaj klopodoj de nia sindonema samideano Josef KOCH, estis decidite refondi la grupon. La nova*

*grupo nun kalkulis 20 membrojn, el kiuj 14 estas junuloj kaj novuloj. Ili ĉiuj estis gajnitaj pere de la "Korespond-varbmetodo" de s-ro KOCH.*"

La sekreto de la sukceso de la varbmetodo de Josef KOCH konsistis en tio, ke li distrumpetis al la homoj, ke pere de la lingvo esperanto oni povas korespondi kun homoj el Ameriko kaj aliaj foraj landoj. Tio ŝajne estis preskaŭ revolucia novaĵo por homoj, kiuj neniam aŭdis pri esperanto aŭ kredis ĝin mortinta.

Al la ĵus revekigiĝinta grupo aliĝis **Johann MOHR, GRAF** kaj **Heinrich LAUBER**. Tiu lasta prezidis la grupon plurajn jarojn ekde 1933, lin sekvis Josef KOCH ĝis 1947.

La germandevena Johann MOHR, inĝeniero kaj teknika oficisto ĉe SFF en Lucerno, lernis esperanton kiel 76-jarulo kaj longe ludis ĉefan motoran rolon en Lucerno, funkciante kiel prezidanto ekde 1947 kaj de UEA-delegito almenaŭ ĝis la komenco de la ses-dekaj jaroj.

Sub la influo de Johann MOHR kaj Josef KOCH en 1946 fariĝis esperantistino ankaŭ **Sonja BRUN**, kiu poste portempe loĝis eksterlande, ankaŭ aktivante por esperanto, kaj ekde 1987 denove estis je la dispono de la lucerna grupo, de UEA kaj de Kooperativo de Literatura Foiro.

Ĉi tie mi volas mencii ankaŭ **Hans-Peter ISAAK**, kiu interesiĝis pri esperanto jam kiel 14-jara knabo. En 1951 li partoprenis kurson gvidatan de Johann MOHR. En 1979 li ree aliĝis al la lucerna grupo. Hans-Peter ISAAK, kiu

estis sufiĉe konata gitaristo kaj instruisto, bedaŭrinde tro frue forpasis la 15-an de decembro 1998 (zamenhofa tago!).

Komence de la kvindekaj jaroj la lucernanoj ŝanĝis sian grupan kunven-ejon. De la hotelo "De la Paix" ili translokiĝis al hotelo "Du Théâtre".

En 1955 lernis esperanton **Paul SCHERER** per la kurso *Esperanto en 5 Lehrbriefen* laŭ instruado de Johann MOHR kaj dum feriosemajno en Münchenwiler li akiris la ateston pri lernado. En 1956 li aliĝis al la Lucerna Esperanto-Grupo. Li fariĝos ĝia prezidanto kaj deĵoros en tiu funkcio 10 longajn jarojn inter 1962-1972. Post oficado kiel vicprezidanto ĝis 1979, la membroj, de la intertempe renomumita Lucerna Esperanto-Societo, elektis lin denove prezidanton. Ĉi tiun honoran taskon li daŭre prizorgas.

Al ĉi tiu tria generacio de esperantistoj apartenas ankaŭ la sekvaj samideanoj kaj samideaninoj:

**Emil GEHRING**, diplomita inĝeniero ĉe *SFF*, esperantisto ekde 1959, fakdelegito de UEA pri fervojoj, 1966-1969 vicprezidanto de *SAEF* kaj kasisto de la Lucerna Esperanto-Grupo dum multaj jaroj. Emil GEHRING furoris per kelkaj agadoj precipe en la sepdekaj jaroj: li produktis esperanto-stampilon, iniciatis priesperantan montrofenestron ĉe la turisma vendejo Casagrande en la malnova urbo, ktp. Li mortis 92-jara en 1987.

**Reinhard (Rinaldo) ALBUS**, diplomita forstinĝeniero kaj inĝeniero ĉe *SFF*, prezidis la lokan Esperanto-Grupon en 1961/1962. Li mortis en 1982.

**Luciano ORTELLI**, spite al sia blindeco, funkciis kiel sekretario inter 1961 kaj 1976.

**Heinrich LORENZ**, aŭstro loĝanta ekde 1956 en Lucerno, aŭtoris sub la pseŭdonimo Lorenz URBANO la utopian poemaron *Zauberwort Weltrekord*. El sep nacilingvoj li esperantigis proksimume mil mondfamajn kantojn, ariojn, poemojn kaj psalmojn, interalie el GOETHE, SCHILLER kaj P. Alberich ZWYSSIG. Li mortis en 1980.

**Lisel LÖTSCHER** estis sekretariino en la kvindekaj kaj kasistino en la sesdekaj jaroj.

### Pri la Interlingua-konkurenco

Alveninte en la kvindekaj jaroj, necesas diri kelkajn vortojn pri la tiama konkurenco al la esperanto-movado post la apero de la lingvo Interlingua en 1951.

Ankaŭ ĉi tiu projekto de IALA trovis kelkajn adeptojn. Unu el la plej aktivaj el ili, preskaŭ fanatika, estis varbita en la persono de Hugo FISCHER (1901-1978). Ĉi tiu katolika kuracisto en Escholzmatt, kiu estis bona konanto de la latina kaj de latinidaj lingvoj, kredis, ke la internacia helplingvo devas esti latineca kaj fonto el la "latin-ibera" mondkoncepto. Esperanto ŝajnis al li tro artefarita. Iam adepto de Ido, Hugo FISCHER komence de la kvindekaj jaroj transiris al la lingvo Occidental-Interlingue. La 1-an de aŭgusto 1957 li proklamis sian aliĝon al *Interlingua* de IALA. Sekve li vigle propagandis ĉi tiun planlingvon interalie en la svisa Rotario-Klubo. En la dua internacia kongreso de Interlingua en 1957 en Bazelo, Hugo FISCHER estis nomumita

konsilanto de *Union Mundial pro Interlingua* kaj gvidanto de ĝia scienca sekcio. En 1966 li fariĝis prezidanto de la Svisa Interlingua-Sekcio kaj starigis post la morto de Stefan BAKONYJ la fondaĵon *Fundation BAKONYJ pro Lingua Universal* kun sidejo en Lucerno. Ĝia celo estis subvencii la sciencan esploron pri la universala lingvo kaj en Interlingua. En 1969 Hugo FISCHER mem transprenis la prezidon de la fondaĵo. Tamen lia espero, ke Interlingua, kiu estis iom signife utiligata por sciencaj tradukoj, estos adoptita de la romkatolika eklezio, montriĝis vana. Kun la morto de Hugo FISCHER en la jaro 1978 la influo de Interlingua en Lucerno forbloviĝis kaj per tio ankaŭ la seriozaj minacoj kontraŭ la zamenhofa idiomo.

### Al kulmina esperanto-evento

En 1960 la Svisaj Esperanto-Tagoj okazis en Lucerno ĉe hotelo Rütli. Kaj en 1961 la Esperanto-Grupo sukcesis munti ekspozicion en la lucerna Trafik-Muzeo, kies oficiala prospekto enhavis ankaŭ resumon en esperanto.

En 1972 en la urbeto Sempach ekloĝis la aktiva flandra esperantisto **Hector BOFFEJON** kaj sekve li membriĝis en la lucerna Esperanto-Grupo. Li forpasis en 1983.

En la sepdekaj jaroj inter 1972-1979 la Esperanto-Grupo estis prezidata de **Johann LUTZ**. Ĉi tiu simpatia romanĉdevena trajnestro lernis esperanton en 1967. Dum multaj jaroj en lia hejmo en Kriens estis kompostataj kaj presataj la periodaĵoj *Svisa Fervojisto*, *Svisa Esperanto Revuo* kaj *La Lucerna Progreso*, kaj ankaŭ diversaj informiloj

kaj varbiloj. En sia aktiveco li estis helpata de sia (same retoromanĉa) edzino **Julietta LUTZ-PAROLO**. Johann LUTZ mortis bedaŭrinde jam en 1992.

### La 64-a Universala Kongreso

Kiel LKK-ano Johann LUTZ helpis organizi la plej kulminan esperanto-eventon iam ajn okazintan en Lucerno – nome la 64-an Universalan Kongreson en la lucerna Kongresejo. Al Lucerno pilgrimis 1635 esperantistoj el 48 landoj. Al la honora komitato apartenis interalie Hans-Rudolf MEYER, eksurbestro de Lucerno kaj ano de la Svisa Parlamento, Josi J. MEIER, membrino de la Nacia Konsilantaro kaj Anton HÄNGGI, episkopo en Bazelo.

Ekskursoj okazis interalie al la montoj Pilatus, Rigi kaj Titlis. La Internacia Infana Kongreseto loĝis en la lucerna Junulara Gastejo. La lucerna gazetaro ĉiutage raportis pri la kongreso, la turisma oficejo eldonis koloran prospekton plene en esperanto kaj la Centra Biblioteko de Lucerno kaj la Trafik-Muzeo muntis ekspoziciojn pri esperanto. Kadre de la filatela servo aperis svisa poŝtmarko je la valoro de 70 centimoj kaj unuataga koverto.

La anoj de SAT verŝajne estis tiom impresitaj de la elstare organizita lucerna Universala Kongreso, ke pro tio en 1981 ili decidis okazigi sian postkongreson en la mezlernejo "Alpenquai".

### Nova generacio da esperantistoj

La lucerna Universala Kongreso generis tute novan, tre aktivan kvaran generacion da esperantistoj, kiuj esence refreŝigis la vivon de la loka Esperanto-

Grupo, kiel kutime okaze de tiaj grand-eventoj.

Al la grupo, kiu en 1980 ŝanĝis sian nomon al Lucerna Esperanto-Societo kaj per tio sian statuton de la jaro 1948, aliĝis - antaŭ, dum aŭ post la kongreso - la sekvaj novaj membroj kaj membrinoj:

**Annelies DETTLING-AMMON.** Post la morto de Emil GEHRING ŝi servis dudek jarojn kiel societa kasistino.

**Renata FILALI** en Kriens estis sekretariino kaj kasistino en la naŭdekaj jaroj. Ŝi iniciatis esperanto-kurson por infanoj kadre de "Ferienpass".

**Konrad REY** en Littau. En la okdekaj jaroj li aperigis multajn artikolojn ĉefe surbaze de la tiama informilo *Esperanto-Information* kaj prizorgis la montrofenestron de SAEF en la lucerna stacidomo.

**Franz BRÜGGER** dum multaj jaroj instruis esperanton ĉe la "COOP-lernejo" en Lucerno kaj famiĝis pro la iniciato "Tago X" cele al la enkonduko de esperanto en Svislando. Krome Franz BRÜGGER dum pluraj jaroj gastigis kaj prizorgis la grupan bibliotekon, kiu en 1999 estis transprenita de CDELI en La Chaux-de-Fonds fare de Claude GACOND.

Kun **Margrit BRÜGGER**, la edzino de Franz Brügger, menciindas ankaŭ la edzino de Paul SCHERER, **Margrit SCHERER**. Ambaŭ faris tre utilan servon kiel tajpistinoj kaj Margrit SCHERER aldone kiel retroŝt-sendantino.

**Angelo MELLINI** el Argovio estas esperantisto jam ekde 1982. Li prizorgas la interretan hejmpaĝon de

Lucerna Esperanto-Societo kaj verkas kaj eldonas diversmaniere. Li estis ankaŭ estrarano de SES.

**Karlota ECKLIN** estis intervjuita de Radio Pilatus.

Ni ankoraŭ menci **Rosa METTLER** kaj **Andy KÜNZLI**. Tiam 17-jara gimnaziano li ekaktivis lanĉante la periodaĵon *La Lucerna Progreso*, de kiu ĝis 1985 aperis 18 numeroj.

### Menciindaj aktivecoj

En tiu kongresa tempo efektiviĝis surstrataj varbagadoj kaj lingvokursoj ĉe COOP, gvidataj de Franz BRÜGGER kaj Sonja BRUN, kiu post multjara restado en eksterlando revenis en 1987 al Svislando kaj transprenis krom la ofico kiel estraranino de la loka grupo en 1995 ankaŭ la postenon de la ĉefdelegitino de UEA por Svislando, kiun ŝi plenumas ĝis hodiaŭ.

En 1981 la membronombro de Lucerna Esperanto-Societo atingis la rekordon de 30 anoj. Sugestita de **Emil GEHRING**, la propono de Lucerna Esperanto-Societo bapti la sennoman ponton „Werftbrücke“ en la lucerna haveno je la nomo de esperanto bedaŭrinde ne estis aprobita de la urba registaro.

Ĝis nun la kunvenoj de Lucerna Esperanto-Societo sub la nelacigebla prezido de Paul SCHERER okazis regule, inkluzive de specialaj konversaciaj renkontiĝoj. La societo plurfoje ŝanĝis sian kunvenejon (restoracioj Alpenhof, Johanniter, Spatz, Simplon, lernejo Wartegg) kaj ekde kelkaj jaroj kunvenas en restoracio Emmenbaum en Emmenbrücke.

La manko de novaj fortoj iom minacas la societon je stagnado. Tamen rimarkinda estas ankaŭ ĝia fidela kunlaboro kun SES, la lucernanoj fidele partoprenas la ĝeneralajn kunvenojn kaj aliajn renkontiĝojn organizitajn de SES, KCE aŭ LF-koop. Minimume dekfoje Lucerno gastigis la ĝeneralan jarkunvenon de SES. La lucernanoj troviĝis cetere ankaŭ ĉiam inter tiuj, kiuj serĉis kontakton kaj kunlaboron kun samideanoj en aliaj partoj de Svislando, iniciatis vizitojn de siaj membroj al aliaj societoj kaj invitis membrojn el aliaj kluboj al Lucerno kaj ĉeestis naciajn esperanto-kunvenojn kaj internaciajn esperanto-kongresojn.

Koncerne la klubprogramon mi observis, ke la lucernanoj havis la kapablon kaj forton kompili buntan kaj multflankan jarprogramon, donante akcentojn kaj al la klerigo, kaj al la distro de la propraj membroj kaj al la publika propagando de la lingvo esperanto.

### **La nuna membraro**

Jen laŭalfabete la nomoj de la membroj de Lucerna Esperanto-Societo laŭ la listo de la jaro 2002:

**Louise BACHMANN, Franz kaj Margrit BRÜGGER, Margrit M. BRÜGGER., Maurus BRÜLISAUER** (filino), **Sonja BRUN, Rosmarie BUCHER, Giuseppe CASTELLI, Annelies DETTLING, Karlota ECKLIN, Renata FILALI, Gudrun IMFELD, Angelo MELLINI, Rosa METTLER, Carla MÜLLER, Luciano ORTELLI,**

**Konrad REY, Monika RUCKLI, Margrit kaj Paul SCHERER, Reny SUESS.**

En sia propra kroniko pri Lucerna Esperanto-Societo, Paul SCHERER skribas:

*“Tiu ĉi kroniko montras, ke ne eblis ĝenerale interesi aŭ eĉ gajni la publikon por la genia homarana lingvo. La pluraj kaŭzoj estas konataj, kaj la ĉefa estas ja la angla, kiu eŭforigas grandan parton de la homaro. Tamen pozitive fakte, ke la aktivuloj sur la diversaj kampoj kaj je multaj okazoj ĝuis la scipovon de esperanto.”*

### **Konkludaj vortoj**

Verkante ĉi tiujn liniojn, mi venis al la firma konvinko, ke necesas admiri la kuraĝon kaj paciencon de la lucernaj esperantistoj, kiuj, kvankam malmultnombraj, dum jardekoj sukcesis kvazaŭ seninterrompe defendi “la noblan zamenhofan aferon de la esperantismo” kontraŭ plej diversaj minacoj el interne kaj el ekstere de la planlingva movado. Mi opinias, ke ni, lokaj esperantistoj, ne povas kulpi, ke la homaro ne adoptis esperanton, sed necesas sincere danki ĉiujn tiujn personojn, kiuj klopodis diskonigi la ideojn de la esperantismo ankaŭ sur la loka nivelo kaj kiuj kontribuis al tiu longa esperanto-historio en Lucerno, portante la verdan stelon de generacio al generacio.

Andy KÜNZLI

Lucerno, la 6-an de aprilo 2002

# Pri Svislando

## Svislando

### ne plu « escepta kazo »

Antaŭ dek jaroj la oficiala doktrino pri la armita neŭtraleco estis ankoraŭ forte ankrita en la menso de multaj svisoj. Laŭ tradicia memkompreno Svisio devigis sin al neŭtraleco inter du militantoj. Sed fakte ĝi ne estis strikte neŭtrala dum la dua mondmilito. Tion sciis homoj provantaj sobre prijuĝi la sintenon de Svisio dum tiu periodo kaj la tiutempajn okazaĵojn. – Meze de la naŭdekaj jaroj estiĝis grava krizo kaŭzita de fortaj premoj ĉefe el Usono pro la tiel nomataj bankkontoj sen novaĵoj iam apartenintaj al la viktimoj de naziaj ekstermoj. Tiam la registaro decidis krei sendependan ekspertan komisionon de historiistaj fakuloj svisaj kaj nesvisaj, kiuj ricevis la taskon esplori la sintenon de Svisio dum la dua mondmilito. Gvidis ĝin profesoro Jean-François BERGIER. Dum kvin jaroj ili traserĉis ŝtatajn arĥivojn kaj tiujn de firmaoj, kolektante materialon koncerne la rilatojn inter Svisio kaj Germanio dum la milito.

### La raporto BERGIER

En la monato marto de ĉi jaro oni prezentis la lastan volumon kun la konkludoj de la komisiono. Entute eldoniĝis 25 monografiaj studoj ampleksantaj 11 000 paĝojn. Koncerne la ekonomian kunlaboron kun Germanio

la komisiono konstatas, ke Svisio ne povis elekti kaj estis devigata komerce rilati kun la aksaj potencoj. Sed la tezo, laŭ kiu la eksportoj, servoj kaj kreditoj signife influis la evoluon de la milito ne konfirmiĝis. Same la riproĉo de la aliancanoj kaj poste de la raporto Eizenstat (1997), ke Svisio kontribuis al la plilongigo de la milito estas senfunda. Ankaŭ la akuzoj, ke la svisaj bankoj prosperis sekve de havaĵoj deponitaj de la viktimoj malaperintaj dum la dua mondmilito ne estas motivita. Sed oni konstatas, ke la bankoj post la milito ne serioze klopodis trovi la heredantojn de la sennomaj kontoj kaj havaĵoj.

### La politiko pri rifuĝintoj

Laŭ profesoro BERGIER ĝi estas la plej kritikinda aspekto de la sinteno de Svisio dum la dua mondmilito. Oni nur tre restrikte akceptis rifuĝintojn kaj pro tro « leĝeca » interpretado de la neŭtraleco ne konformiĝis al la moralaj postuloj de humaneco. Efektive tiuj faktoj estis jam konataj ekzemple per studoj de Alfred HÄSLER *La boato estas plena* (1967) aŭ Edgar BONJOUR *Historio de la svisa neŭtraleco* (1970). Laŭ la tiama kompreno de la ŝtataj instancoj kaj de la popolo la armita neŭtraleco kontribuis grandparte al la neimplikiĝo en la milito kaj estis rimedo por konservado de la sendependeco. Svisio ja akceptis rifuĝintojn, sed kial oni fermis la limojn por judaj rifuĝintoj en 1942, en momento kiam Svisio estintus por ili la sola ebleco saviĝi kaj sci-

ante, ke oni puŝis ilin al probabla morto? La fakuloj de la raporto BERGIER estas persvaditaj, ke la politikistoj kaj administraciaj responsuloj sciis, ke pli larĝanima sinteno havus nek politikajn nek ekonomiajn sekvojn.

### Reagoj

Oni prijuĝis la raporton BERGIER diversmaniere. Enlande kaj eksterlande la reagoj estis ĝenerale pozitivaj. Oni konsideras ĝin necesa kontribuo al la kompreno de tiu malluma periodo. Nur el la dekstre naciisma tendaro oni riproĉas, ke ĝi pritraktas sole la negativajn aspektojn kaj ne sufiĉe konsideras la malfacilan situacion de eta lando minacata en sia ekzisto. Ne eblas en tiu mallonga resumo pritrakti detalojn, ĉar la fina kaj konkluda volumo estas dika libro, kiun oni devus


unue studi, dum la unuopaj monografioj interesas precipe la specialistojn.

### Normaliĝo kaj aliĝo al UN

La debatoj pri la raporto BERGIER evidentiĝis dum la lastaj kvin jaroj, ke Svisio ne plu estas « escepta kazo » sed tute normala lando kiel ĉiuj aliaj, ne pli bona, ne malpli bona. Tio ŝajne influis la decidon de la popola plimulto, kiu nun akceptis per voĉdono aliĝon al UN. Dum en 1986 tri kvaronoj de la voĉdonintoj estis ankoraŭ kontraŭ la aliĝo, en la monato marto de ĉi jaro 55 % akceptis la proponitan aliĝon. La turniĝo de 1989 kun la fino de la malvarma milito ŝanĝis la politikan situacion kaj la opinio en Svisio evoluis en la lastaj jaroj.

Richard SCHNELLER

-oOo-



# Kongresen

## Raporto pri la kongreso de SAT-Amikaro en Metz

Paske mi partoprenis la kongreson de SAT-Amikaro, en Vigny proksime de Metz, nordoriente de Francio. Mi tre ĝojis promeni en la arbaro. Ni estis tre bonŝancaj pri la vetero! Vere dolĉa suna printempo...

La temo de tiu kongreso estis la verkisto Raymond SCHWARTZ. Li naskiĝis en 1894, kaj mortis en 1973. Li skribis kabaretaĵojn. En lia tempo, li estis fame konata kiel humoristo. Dum busa ekskurso ni vizitis lian tombon en tre malgranda tombejo de la vilaĝo Moncheux, kie li longe vivis. Mi intencas legi nun lian ĉefverkon "Kiel akvo de rivero", pri kiu Ed BORSBOOM

multe parolis, kaj en kiu la aŭtoro priskribas la regionon.

Ni bedaŭris, ke pluraj interesaj okupoj okazis samtempe... Malfacilis elekti! Ekzemple mi ne povis promeni per la turisma trajno kun dizelmotorvagono, nek viziti la muzeon de la fer-minejoj, nek diskuti en la grupo de André GROSSMANN, nek aŭskulti pri "Ekoturismo" de Petro CHRDLÉ. Mi multe bedaŭris! Sed, krom la vivplena dutaga prelego de Ed BORSBOOM, mi sekvis ege interesan prelegon de Georges KERSAUDY (en la franca) pri orientaj lingvoj de Eŭropo. Li scipovas 51 lingvojn!!! Li publikigis la libron *"Langues sans frontières: à la découverte des langues de l'Europe"*, en kiu li tre favore parolas pri esperanto.

Ni havis du koncertojn: la grupo MANNIJO (du knaboj, unu germano kaj unu franco el la regiono) kaj koncerto de Jak LE PUIL, franco, kiu kantis esperantajn kanzonojn.

Marde ni ekskursis en Metz (la loĝantoj prononcas "mes"), kies katedralo (42 m alta navo) multe plaĉis al mi! Dank'al 6 500 kvadrataj metroj da vitraloj, ĝi estas la plej luma de Eŭropo. Tiu urbo havas 125 000 enloĝantojn (200 000 kun la ĉirkaŭurbo). Ĉie oni admiras parkojn kaj ĝardenojn. La rivero Moselle (mozel) dividiĝas en pluraj brakoj, inter kiuj troviĝas insuletoj. Sur ili konstruiĝis preĝejoj, teatro, kazernoj kaj domoj. Alia rivero tie estas la Seille (sej). La impona stacidomo, longa je 300 m, estas tipa germana neoromana stila konstruaĵo.

Unu prelego temis pri ATTAC. Mi neniam aŭdis pri tio antaŭe. Ĝi ekzistas en 32 landoj. Ĝia celo estas interalie "kontraŭi la financon tutmondiĝon kaj denunci la sovaĝan liberalismon, kiu generas neegalecojn, malriĉecon, mizeron, ekonomian malkreskon kaj damaĝon de la medio". "Tusimple re-proprigi al si kune la estontecon de nia mondo". Tiuokaze iu montris sian "civitan pasporton" de la mondo, laŭ Romain GARY.

Mi sekvis kurson pri "esperanto en komputilo", de André GROSSMANN, al kiu mi aĉetis kompaktdiskon por havi la supersignojn eĉ en la retmesaĝoj. Mi vidos, ĉu mi sukcesos instaligi ĝin! Li ankaŭ parolis pri la programo "Ek". Mi ne certas, ke mi ĉion komprenis... Sed mi tre interesiĝis!

Fine mi aŭdis prelegon pri la franka lingvo, ĝermana lingvo pli malnova ol la germana! Oni trovas ĝin en la regiono de la departemento Mozelio, parto de Germanio, Luksemburgio, Belgio kaj Elzaco. Eĉ KAROLO LA GRANDA (Ŝarلمانj) parolis ĝin! Nun ĉefe la maljunuloj memoras pri ĝi...

La fama frukto de la regiono estas la mirabelo, ora dolĉa frukto, el kio oni faras desertojn kaj brandon. Ni tre bone manĝis en la restoracio de la Centro ADEPPA, kie ni loĝis, kaj en Metz dum la ekskurso!

La kongreso estis tre bone organizita, kaj mi rekomendas al ĉiuj partopreni ĝin venontan Paskon!!!

Nancy FONTANNAZ.